

La programita instruado de Esperanto en Svislando (1)
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 684, 1976.11.17 & 19 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Mi estas invitita prezenti raporton pri la apliko de la programita instruado al la planlingva instruado en la Internacia Konferenco pri Interlingvistiko okazonta de la 24-a ĝis la 28-a de novembro kaj organizita de la Esplorcentro pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn en Germanio federala. La saman raporton mi prezentos al vi dum prelegaro, por ke vi havu ideon pri la poresperanta laboro efektiviĝinta ĝis nun en Svislando koncerne la programitan instruadon de nia lingvo.

A.- Kultura Centro Esperantista posedas nombron da kursoj programitaj. Jen ilia listo:

Cl.- Ekde 1970 funkcias Elementa kurso de esperanto programita por franclingvanoj, kiu nuntempe konsistas el 13 ĉapitroj. Tiu ĉi senpaga kurso montriĝis ege efika, tiel ke la plimulto de la nunaj poresperantaj aktivuloj en Romandio lernis nian lingvon pere de ĝi.

A.- Ekde 1971 ekzistas programita teatraĵo sub la titolo Dialogues programmés. Temas pri kurso uzata por akirigi al la gelernantoj parolrefleksaron. Ankaŭ ĝi montriĝis tre taŭga helpilo. Plej ofte ĝi estas uzata kiel komplemento al la ĵus antaŭe menciita programita kurso. Nuntempe pretiĝas definitiva eldono trilingva de tiu ĉi teatraĵo: eldono franca, germana kaj itala.

Cl.- Ekde 1972 estas eksperimentata programita kurso pri la vortformado en esperanto, titolita Comment l'espéranto forme ses mots. Kritiko pri ĝi estas rikoltataj, antaŭ ol ĝin eldoni.

A.- Ekde 1973 estas uzebla tre efika enkonduka aŭd-vida kurseto, kies celo estas komprenigi dum seshora periodo, kio fakte estas esperanto. Ĝi ekzistas sub tri formoj: por la franclingvanoj ĝi nomiĝas Cours audiovisuel d'initiation à l'espéranto, por la germanlingvanoj Schnell-Einführungskurs in Esperanto kaj por la itallingvanoj Introduzione all'Esperanto; Corso audio-visivo e programmato. Tiu ĉi kurso estas ĝenerale uzata por enkondukaj kursoj semajnfinaĵ aŭ kiel malfermo al aŭd-vidaj kursoj.

Cl.- Ĉiam por la aŭdvida instruado Kultura Centro Esperantista posedas programitajn lecionojn kaj instruprogramon. Okaze de pedagogiaj seminarioj semajnfinaĵ aŭ feriaj, geinstruistoj intimiĝas kun tiu ĉi malfacila, sed ege efika instrutekniko, kiu rapide paroligas la gelernantojn.

A.- Kultura Centro Esperantista nuntempe pretigas antologieton da belaj tekstoj el la plej konataj esperanto-verkistoj. Akompanas tiujn ĉi tekstojn programitaj lingvaj kaj gramatikaj ekzercoj. Dank'al tiuj ĉi flugfolioj la instruistoj povos emancipiĝi de la ĝenerale nekontentigaj lernolibroj profite al la aŭdvida kaj antaŭplanita instruado de esperanto. Tre efika helpilo estas la perflanela instruilo, kiu kvazaŭ radiografie vidigas la mekanismojn de la vortformado.

Cl.- Okaze de pedagogiaj seminarioj semajnfinaĵ aŭ feriaj, instruistoj fabrikas la materialon necesan al la perflanela instruilo kaj intimiĝas kun tiu ĉi instrutekniko, kiu faras miraklojn.

A.- Estas bone, ke la gelernantoj rapide akiru ekzaktajn sciigojn pri la disvolviĝo de esperanto kaj pri ties situo en planlingvistiko. Tial sub la titolo L'Essor de l'espéranto Kultura Centro Esperantista publikigis kurseton, kiu nuntempe estas submetata al la kritikado de historiistoj.

Simila studo aperos sur la titolo La disvolviĝo de esperanto aldone al la programita teatraĵo. Parto jam aperis en Sennaciulo por festi la okdekan jaron de esperanto.

Cl.- Por helpi la komencantojn en la legado de unua libro Kultura Centro Esperantista komencis programi helpilon al la libro Aventuroj de pioniro de Edmond Privat. Bedaŭrinde la eldonejo Stafeto ĉesis funkcii kaj la libro pro tio elĉerpiĝis. Se Stafeto ne baldaŭ revigliĝos, alia facila libro devos esti elektita. Tre verŝajne ĝi estos Jaroj sur Tero de Sinha.

A.- Fine ni menciu, ke paralele al la pretigo de instru-programo por la aŭd-vida instruado Kultura Centro Esperantista eksperimentas instru-programon por la instruado per drama. Temas pri la uzo de pupteatro. Estas fakto, ke la infanoj multe pli facile parolas, kiam ili funkciigas kaj paroligas pupojn malantaŭ teatra scenejo, ol kiam ili sidas ĉe tablo apud instruisto. Tion ĉi ni provas ekspluati profite al la porinfana instruado.

Cl.- En la komenco de nia agado ni facile akceptis disdoni nian instrumaterialon al interesataj instruistoj, sed iom post iom ni fariĝis pli kaj pli hezitemaj tiurilate. Ni konvinkiĝis, ke nenio improviziĝas. La programita, la aŭd-vida kaj la per drama instruadoj estas efikaj, nur kiam ilin praktikas spertaj instruistoj. Tial Kultura Centro Esperantista fine adoptis la ĉi sekvan sintenon. Rajtas eksperimente uzi niajn instruteknikojn la instruistoj, kiuj partoprenas niajn pedagogiajn seminariojn. Se pedagogo ĉesas frekventi niajn semajnfinaĵajn aŭ feriajn kursojn, tiam ankaŭ ni ĉesas helpi lin. Nur en la kadro de vera pedagogia skolo povas naskiĝi efika didaktiko.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012